Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Tre variis “Prezento de spertoj ”

La 7-an de septembro, en nia muzeo okazis ĉiujara evento «Prezento de Spertoj» de niaj membroj. 9 personoj parolis entute pri 10 temoj. Venis 12 membroj entute.

Jen estas la paroltemoj, kaj mallongaj komentoj.

・Suzuki Keiichiro: **IJK kaj Indonezio** / Li partoprenis en la 81a Internacia Junulara Kongreso, unuafoje okazinta en Indonezio.

・Namba Fumiharu (1): **Ytterby, historia loko por kemiistoj** / Li, survoje al UK, flanken vojaĝis al sveda eksminejo, fama pro eltrovo de iterbio kaj aliaj elementoj.

・Kanoo Hiroyuki: **Iluminado de Parko Yamasita en 2024** / Li spektis kaj videoreigistris iluminadon lastajaran.

・Doi Hirokaz: **Filmeto ‘Libro kaj Fajro’** / Li prezentis filmeton faritan de s-ino Sato Miku, kiu produktis filmon loĝanta en Amsterdamo.

・Mizro Iwaya: **La 110-a Universala Kongreso en Brno** / Li kaj lia edzino partoprenis en la UK en ĉeĥa urbo Brno.

・Namba Fumiharu (2): **Mi ĝuis la Universalan Kongreson en Brno** / Li ne nur estis en la UK mem, sed postkongrese vizitis Hungarion.

・Sibayama Zyun’iti: **Baldaŭ eldonota “Ilustrita Vortaro de Esperantaj Onomatopeoj kaj Interjekcioj”** / Li, por prezenti tiun libron (fakte eldonitan en la 20a de septembro), prezentis kvize ne konatajn onomatopeojn kaj interjekciojn.

・Doi Ĉieko: **Japanaj Esperantistinoj** / Ŝi prezentis japanan gazeton «Sentaku» (Selektado), en kiu aperis esperantistinoj.

・Miyazaki Hideko: **Mia nova muzikinstrumento, blovklavaro** / Ŝi prezentis kantojn per la nove lernita instrumento.

(Noto: ne vizitis Japanion aŭstraliano.)



■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

Ĉi-jaraj kongresoj en Okajama

Doi Ĉieko

Okazis La 11a Azia-Oceania Kongreso kaj la 112a Japana Esperanto-Kongreso en la urbo Okajama en la 20a-22a de septembro 2025.

En la kongreso s-ro Sibayama Zyun'iti ricevis la Premion Ossaka pro riĉaj Esperanto-agadoj en Japanio: redaktado de "La Revuo Orienta", diversaj agadoj de Esperanto kiel la prezidanto de JEI (de 1999 ĝis 2012), publikigo de "Esperanto-Japana Vortaro" en 2006 kaj la okazigo de La Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo en 2007 ktp. Sed bedaŭrinde oni ne menciis pri la fondo de nia Muzeo. Li prelegis pri siaj agadoj ĝisnunaj en la kongreso.

Partoprenintoj estis entute 389: 298 enlandaj kaj 91 eksterlandaj; membroj de nia klubo kaj ĝiaj familianoj estis 10: Akiya Hideo, Suzuki Keiichiro, Iwaya Mizro kaj Miyuki, Sibayama Noriko kaj Zyun'iti, Doi Hirokaz kaj Ĉieko, Namba Fumiharu kaj nominale Tanigawa Hirosi. La kongreso havis internacian etoson kun 91 eksterlandaj partoprenintoj: 49 el Koreio, 4 el Germanio, 3 el Ĉinio, 2 el Indonezio, el Irano kaj el Nederlando, unu persono el la landoj: Mozambiko, Brazilo, Honkongo, Francio, Filipinoj, Salvadoro, Singapuro, Vjetnamio, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj kaj Kanado. Povas esti ankoraŭ kelkaj, kiuj aliĝis poste.

Antaŭ kaj post la kongreso kelkaj vizitis nian Muzeon en Jokohamo, tre fora de la kongresejo en Okajama. Tio montrus, ke la muzeo fariĝus vizitinda loko en Japanio, kiam ili venas al Japanio.

Al la kongreso venis gratulaj mesaĝoj de la urbestro de Okajama (Oomori Masao) kaj de la prezidanto de UEA (Fernando Maia Jr.), de la Vicprezidanto de UEA kaj Prezidanto de KEA (So Jinsu), de la Vicprezidanto de ILEI (Alessandra Madella) kaj de la Prezidanto de JEI kaj LKK (Loka Kongresa Komitato: Kitagawa Ikuko). La programeroj estis riĉaj, kaj do ni ne povas informi ĉion ĉi tie.

Krom la ĉefaj programeroj okazis ankaŭ ekskursoj al la Kastelo de Okajama kaj la najbara urbo Kuraŝiki histori-riĉa. Okazis ankaŭ ekskursoj al la najbara urbo Kurashiki, al la Lernejo Ŝhizutani (fondita en 1670) ktp. Multaj partoprenantoj ĝojis ĉeesti en la kongreso, sed ankaŭ ĝuis vizitindajn lokojn proksime de la kongresejo.

KAJTO ankaŭ en nia Muzeo

Okazis ankaŭ kantado de Kajto, kiu estas muzika duopo devena de Nederlando. En la kongreso la duopo kantis Esperantajn kantojn, kiuj ĝojigis la ĉeestantojn. Tamen ne nur tio, antaŭ la kantado en la kongresejo, ili vizitis nian Esperanto-Muzeon en Idogaja (Jokohamo), kaj kantis. Ni multe ĝuis la kantadon, kaj Kajto laŭdis la lokon, nian muzeon, kiu bone funkciis kiel kanto-koncertejo. Ĝis nun ni ne rimarkis, ke la domo taŭgas por kantado, sed Kajto rimarkigis la lokon esti tre konvena por kantado. Antaŭ la prezentado ni hezitis fari koncerton aŭ kantadon, ĉar la loko situas inter ordinaraj privataj domoj, kaj la sono ĝenus ilin. Sed tio ne estis timinda.

Estis tre bedaŭrinde, ke nur 4 membroj de nia rondo ĉeestis en ĝi, kvankam oni havis informon pri la gastoj. Gvidate de s-ino Aihara ĉeestis ŝiaj geamikoj el Hunabaŝi. Se multaj el niaj membroj ĉeestus en la koncerto, tio donus grandan ĝojon kaj emocion al niaj membroj!

Post la koncerto du paroj el eksterlandoj, kaj s-roj Arai, Namba kaj ni vizitis la ĉinan kvartalon kaj ĝuis bongustan vespermanĝon.

La 136-a Legokunsido

En la 5a de septembro okazis la 136-a Legokunsido por “Printempa teruro” de Julian Modest. Partoprenis 4 personoj.

Impreso pri “Printempa Teruro”

Mizro Iwaya

Tiu ĉi estas facila legaĵo kaj ĉiu komencanto povas legi sen malfacilaĵo. Aperas sinsekve ĉiutagaj laboroj hejmaj kaj eksterhejmaj. Ĉiu komencanto povas kutimiĝi al la esprimoj de Esperanto. Tial tiu ĉi estas rekomendinda al komencantoj.

En alia flanko ankaŭ veteranoj povas ĝui ĝin ĉar okazas diversaj ĉiutagaĵoj unu post alia. Precipe mediprotekta afero starigas ĉefan vertebron en la verko. Multaj aferoj aperas ĉirkaŭ tiu movado kaj fine aperas terura okazaĵo ĉirkaŭ ĝi. Mi volas diri ke tiu “terura okazaĵo” aperis tro malfrue, tial mi atendis kaj atendis ĝin kun iriteco. Nun mi povas diri ke tia terura afero ne havas gravan rolon en tiu verko, tial mi ne bezonis atendi ĝin tiel fervore. Ja kulpas la titolo de la libro.

La ĉefheroino estas Ana. Ŝi havas du gefilojn kaj sen edzo. Li mortis antaŭ jaroj pro malsano. Ŝi estas patrino kaj instruisto, do relative okupata ĉiutage. Ŝia kolegino Vesela ofte helpas ŝin. Ŝi estas membro de mediprotekta grupo kaj ofte invitas Anan al la kunveno. Tie ŝi renkontis Krasen kaj baldaŭ ŝi enamiĝis al li. Tio kaŭzis grandan problemon al ŝi. Mi ne plu parolu pri la enhavo, ĉar estas konsentite ke oni ne devas paroli pri la “krimulo” kiam oni recenzas krimromanon.

Legante la libron, mi rememoris la enhavon de alia libro, nome “La okazaĵo（出来事）” de japana verkisto Ŝiga Naoya. En ĝi komence daŭris ĉiutaga vivo de popolanoj, kaj okazis iu akcidento, poste la aero de la popolanoj vigliĝis kaj ili komencis paroli kaj agadi pli vigle. Ankaŭ Ana fariĝis pli vigla kaj atentema post la okazaĵo. Certe la ĉefaj temoj de la verkoj similas unu al la alia, mi kredas.

Fine mi ripetas ke tiu ĉi libro estas facile legebla por komencantoj kaj veteranoj, tial rekomendinda al ĉiuj. Post la legado mi havis kontentecon dank’ al la aŭtoro.

Kiam venos printempo? Kiam okazos teruro? — “Printempa teruro”

Sibayama Zyun’iti

La ĉefrolulo estas Ana, instruistino vidva

kun du infanoj : bona komenco, sed en kiu sezono komenciĝos la instruistina ĉiutago? En la komenco okazetas afero terura al ŝi, sed tio baldaŭ finiĝis, kaj tute ne estas sekvo. Tial, kiam okazos io terura, kiel la librotitolo aludas? Ŝiaj lernejaj kaj hejmaj tagoj iras kun epizodoj, sed ne estas teruraĵo. En la mezo, iu viro sen edzino, intimiĝinta al ŝi, vizitas ŝian hejmon : ĉu li amtrompos ŝin?; kvankam ŝajne ŝi ne estas sufiĉe riĉa por esti fraŭdita... Fakte io terura okazas, sed mi ne povas diveni la sezonon, ĉu printempan.

Tial mi opinias, ke la titolo kun la vorto teruro estas, kvankam fakta, ne trafa por allogi legantojn. Cetere, la rakontita afero ja teruris Ana-n, sed la aliaj, ekzemple ŝiaj infanoj, ŝajne ne estas vere teruritaj. Tia rakontomaniero havigis al mi iom mankan senton.

La rakonto ĉefe priskribas ĉiutagan vivon, kaj el kultura-lingva flanko, estas kelkaj interesaĵoj. Unu el ili estas la uzo de «Bonan apetiton». Pluraj kunmanĝontoj samtempe elvoĉigas tion, por ekmanĝo. En la japana tradicio, saluto «*Omesiagari kudasai*» (bonvolu manĝi) estas farata de gastiganto, kaj «*Itadaki masu*» (mi manĝos kun danko) estas de manĝonto. Tial la saluto je «Bonan apetiton» estas konata, sed ne praktikata de ni japanoj. Cetere, japanoj uzas manĝofinan saluton «*Goĉisoosama*» (mi ĝuis bonan pladon), kaj eŭrope tiu saluto mankas. Tial la ofta apero de tiu saluto bone impresis al mi ties uzmanieron.

La saluto ĉe telefonfinado, nome «Ĝis reaŭdo» praktikata (ne nur proponita) estas ankaŭ unu trovo en la libro.

Cetere, la libro kun 84 paĝoj kostas, laŭ UEA, 9 eŭrojn — komprenebla prezo, sed vendata en Japanio je 2300 enoj plus imposto, do estas multekosta.

Mia impreso pri “Printempa teruro” de Julian Modest

SIBAYAMA Noriko

Ĉu necesas epitomo en legoimpreso? Mi esploris retejon, do la respondo estas, ke ne nepre necesas epitomo en legoimpreso.

La rakonto-stilo de Julian Modest estas simpla kaj facila al legantoj. Ekzemple en konversacia sceno, Modest malofte uzas la vorton “li” aŭ “ŝi”, sed preskaŭ ĉiam citas la nomon. Do ni povas klare scii kiu alparolas al kiu.

Li emas citi aĝon, koloron kaj formon de okuloj kaj aliaj de la roluloj, tial ni legantoj facile povas imagi kia estas la rolulo.

La ĉefrolulo de tiu ĉi rakonto estas Ana, 35-jara instruistino, kiu perdis sian edzon antaŭ tri jaroj. Ŝi havas du infanojn, 10-jaran Mila kaj 12-jaran Nikolaj.

En iu vespero ŝi estis preskaŭ prirabota je sia retikulo de iu kanajlo. Ŝiaj ĉirkaŭuloj, ŝiaj gepatroj kaj amikinoj, persiste rekomendas ŝian reedziniĝon. Sed ŝi mem sentis, ke 35-jara virino jam ne rajtas denove enamiĝi al iu.

Ĉu en Bulgario oni tiel persiste rekomendas reedziniĝon al vidvino? Antaŭ dekoj da jaroj ankaŭ en Japanio tia fenomeno ofte aperis, sed lastatempe tia aludo fariĝis seksa ĝenado.

Ĉu ankaŭ bulgaro pensas, ke dommastrado estas edzina laboro? Ĉu edzino devas atendi la edzon pretiginte vespermanĝon antaŭ lia reveno? Al mi ŝajnas, ke Modest pensas tiel.

Kaj ĉu 35-jaraĝo estas tro olda por reenamiĝi? Mi opinias, ke aĝo ne rilatas al enamiĝo, plie 35-jaraĝo estas sufiĉe juna.

Poste Ana estas allogita al juna viro Krasen prezentita de amikino Vesela. Krasen kune agis en medioprotekta agado kun Vesela. Kial Ana ekamis Krasen? Mi poste denove legis koncernan parton. Modest plurfoje priskribis la voĉon de Krasen: profunda brusto-varmiga voĉo, voĉo tuŝis Ana kaj restis en ŝia memoro kiel melodio ktp. Mi rimarkis, ke Modest jam aludis la sekvan eventon tie.

Tutleginte mi impresiĝis, ke tie preskaŭ ne sentiĝis ekzisto de gefiloj. Ana ŝajne ne sentas malfacilon pro siaj gefiloj. Ĉirkaŭaj konatoj prizorgas Ana, tamen ne la gefilojn.

Entute mi ĝuis la rakonton atendante kia rezulto venos ĉe la fino.

Traduko

Kial necesas sendi armeon?

Yosano Akiko[*1], tradukita de AKIYA Hideo

Nun[*2] al ni japanoj unu grandega problemo okazis. Kiel ĉiu leganto de lastatempaj ĵurnaloj rimarkas, temas pri la diskuto, ĉu Japanio sendu grandajn trupojn al Siberio, aŭ ne.

Pri tio, kiajn opiniojn ni virinoj havas? Tradicie japanaj virinoj kutimas ne okuli al tia grava problemo. La virinoj, kiuj tute okupiĝas pri hejmo, longe lasis al viroj trakti publikajn aferojn laŭ sia opinio. Sed nun, por vivi senmanke kiel homo, virino kaj viro sendiference, oni bezonas akran senson por scii ĉion, ĝui ĉion, kaj ankaŭ racian menson por kompreni ĉion precize kaj kritiki ĉies valoron. Nun jam venis tia tempo. Por vivi kaj progresi kiel individuo, civitano, kaj homarano oni nun havas liberecojn, egale pensi, egale esprimi siajn opiniojn, kaj egale konduti. Se iu virino intence fermas siajn okulojn kontraŭ tiel grava problemo je preteksto de sia sekso, tio signifas ke ŝi ignoras la devon uzi la civitanajn rajtojn. Kaj laŭ la nova civitana moralo tio egalas al unu speco de peko.

Pri ĉi tiu problemo mi volas prezenti mian propran opinion.

Mia militokoncepto estas jena. Mi senkondiĉe konsentas al la ĉina proverbo: “Armilo estas murdilo”, kaj al la protesto de Tolstoj: “Milito estas violento kiu detruas juston kaj humanecon”. Burokrataj scienculoj, germanstile edukitaj, emas rigardi tiun ideon pri milito kiel fantazion. Sed el ili, Doktoro Hukuda Tokuzō sola menciis: “Se temas pri interpersonaj rilatoj, neniel estas juste bati la alian dekomence por pliigi reciprokan intimecon kaj interkomprenon. Ankaŭ en internaciaj rilatoj, stariĝi kun armiloj jam signifas detruon de la paco, kaj tio estas tute kontraŭdira ago al la justo kaj humaneco. Tial, malgraŭ ĉia preteksto milito estas nenormala de la vidpunkto de justo kaj humaneco. Ne necesas multaj vortoj pri la fakto ke milito mem ne realigas juston kaj humanecon”. Tiel li skribis en la ĉi-monata magazino “Taiyō”. Liaj vortoj brilas antaŭ miaj okuloj. Pri milito mi tute samopinias kiel Doktoro Hukuda.

Do, ĉu oni hasteme esperas tujan abolon de armado? Mi antaŭvidas ke tio apenaŭ okazos. Unuopa nacio sola ne povas aboli nuntempan armadon instalitan por la internacia politiko, sed ne por la interna politiko, krom se iu registaro kiel Leninsekto de Rusio malsaĝe martiriĝus por ekstrema senperfortismo. La abolon oni devas atendi ĝis la tago kiam multaj nacioj povas pace plenumi ĝin en la reciproka interkonsento. Ekde nun oni klopodu por fruigi la alvenon de tiu tago, tiel estas la natura ordo.

Mi komprenas, bedaŭrinde, ke tenadi iom da armado estas neeviteble. Same kiel policanoj necesas por teni la enlandan pacon, al la ŝtato iom da armado necesas por memdefendi la internacian pacon kaj komercajn rajtojn. Tio nepre ne daŭros eterne, sed nur laŭbezone, nekutime ĝis la tago kiam multaj nacioj atingos la kondiĉon, sub kiu ili povas aboli samtempe sian armadon. Tiu “iom da armado” signifas ke ĝi ne superu la skalon de “memdefendo”. Se la armado superas tiun nivelon, ĝi degeneros en la armadon por militarismo aŭ agresismo. Mi timas, ke la japana armado jam delonge superas treege tiun ĉi nivelon.

Nu, pro kio Japanio sendos armeon? Ĉar ĝis hodiaŭ la kaŝema militista registaro neniom diras pri la sendado, ni devas supozi ĝin nur laŭ eksterlandaj komunikadoj kaj argumentoj de civilaj ekspansiistoj. Sed estas klare ke la registaro certe volas tion, ĉar la intervenema registaro ne subpremas ekscesajn argumentojn de la ekspansiistoj kaj en la dieto neniu priparolas senbezonon de la sendado.

Britio kaj Francio, devigante Japanion sendi trupojn, evidente celas savi anti-ekstremistojn en Rusio kaj izoli ĝian teritorion almenaŭ pli oriente de Moskvo de la orienten-invadantaj germanoj. Tiel, ekster la memdefendo, la japanaj trupoj rolos kiel gardistaro por Rusio. La celo ŝajnas grava, sed tute ne estas akceptebla de ni. Rusion devas defendi rusoj mem. Ne ŝajnas ke al rusoj tute mankas defendpovo. Cetere mi dubas, ĉu la germanaj trupoj vere invados orienten, ĉu la rusaj anti-ekstremistoj metos fidon sur Japanion.

La alia celo estas, ke antaŭ ol Germanio potencos Siberion, preventi tion per trupoj estas teorie aktiva rimedo de memdefendo kontraŭ la germana minaco al Japanio, kiu situas proksime al Siberio. Aldone oni diras, ke Japanio devas konservi la grandegan kvanton da japanaj kargoj stagnantan en Siberio antaŭ ol la germanoj transsendos ilin en sian landon. Oni ankaŭ raportis pri la danĝero ke 70-80 miloj da germanaj

kaptitoj en Siberio jam ekarmiĝis.

Sed ni civitanoj nepre ne estu mistifikitaj de tia preteksto “aktiva memdefendo”. Germanoj ankoraŭ ne komencis definitivan batalon eĉ en la okcidenta fronto. Eĉ se ili agas tiel furioze kiel la aliancaj armeoj insultas troe, estas neimagebla ke Germanio sendos parton de siaj armeoj en Siberion kaj tiel minacos Japanion. Britio kaj Francio, kiuj taksas japanan aliĝon al milito malsufiĉa, celas plu peli Japanion en la plagon de milito per diversaj postuladoj. Pro tio ili ege troigos la germanan orienten-invadadon, sed japanoj ne naive kredu tiun troigon.

Japanaj trupoj en Siberio, kredeble, ne batalos kontraŭ la germanaj, do murdoj ne ofte okazos. Sed la sensenca ekspedicio elvokos ĵaluzan suspekton de Rusio kaj Usono (poste ankaŭ de Britio kaj Francio), ke Japanio ambicias teritorion. Plue, la japanaj trupoj ne povos retiriĝi dum pluraj jaroj, kaj ties elspezo ree ŝarĝos nin per enormaj ŝuldoj al fremdlandoj. Tial, eĉ en postmilito nia enlanda vivo malfaciliĝos multoble ol nun. Sekve, la ekspedicio donos al ni danĝeron de sinmortigo, ne la aktivan memdefendon.

En la limigitaj paĝoj mi tre koncize prezentis mian opinion supre. Pro tiu ĉi kialo mi absolute oponas kontraŭ la sendado de la japana armeo.

(Marto, 1918)

Notoj de tradukinto:

*1. Yosano Akiko (1878-1942) estas virina poeto, verkisto en la moderna Japanio; multe komentis pri feminismo, edukado kaj politiko; edukisto, kiu kunfondis la kolegion Bunka Gakuin (1921-2018).

*2. Tiu ĉi gazeta artikolo estis prezentita al Yokohama Bōeki ŝimpō (nuna Kanagawa Ŝimbun), marto 17, 1918, ĝuste antaŭ japana interveno en Siberio (1918-1922). Japanio sendis sian armeon al Siberio kunlabore kun la aliancanoj de la Unua Mondmilito por interveni en la Rusia revolucio de 1917, tamen malsukcese. La longa restado de la japana armeo kaŭzis problemojn en postaj internaciaj rilatoj.

Nove aperis Onomatopea Vortaro



200p 1300enoj

kverelo

insulto

ofendo, blasfemo, insulto ĉe kverelo

esp **azeno!; pest!; aĉ!; merd!; damnen!; damne*; diable*; fek***
jap **baka!; kusottare; ĉikuŝoome: kutabare; ĵigoku e oĉiro**

sezonvorto oktobra

Okita Kazumi

Macutako (Matsutake) まつたけ

Ĝi estas fungo, kiu kreskas en arbaroj de ruĝpino k.a. Ĉar la artefarita kultivado de macutako estas malfacila, la kvanto rikoltata enlande malpliiĝis, kaj tial ĝi fariĝis luksokvalita manĝaĵo.

La importitaj macutakoj, kiuj pasigis tempon dum transportado, perdas sian aromon kaj guston.